La verko *Traços de Osvaldo Cruz* (bibliografiaj notoj, faktoj, okazintaĵoj pri Osvaldo Cruz), estas publikigita en "Memórias do Instituto Osvaldo Cruz, tomo XV, fasc. I — 1922", de D-ro Ezequiel C. Dias, unu el la disĉiploj kaj kunlaborantoj de tiu eminenta brazila sciencisto.

Kiel lastan ĉapitron de sia verko, la aŭtoro transkribis la tuŝantajn vortojn, kiujn Osvaldo Gonçalves Cruz skribis al sia familio: — *Últimas vontades* (Lastaj voloĵoj).

D-ro E. C. Dias nur almetis la jenan noteton: "Tre volonte mi aldonas, sen komentario, tiun malgrandan trezoron de amo, honoro kaj malegoismo, kiun lasis la Majstro, en notoj ne retuŝitaj, nekompletaj, krajone skribitaj. En la originalo mem, plena de neprecizaj, nervaj strekoj, oni observas la emocion, kiu en momento de tiel ega travivaĵo ekposedis tiun fortan, superan spiriton, memorante siajn karegajn estulojn".

LASTAJ VOLOĴOJ

Mi deziras sincere ke, okaze de mia morto, oni ne prizorgu la observadon de la konvenciaj formalizaĵoj, kiujn la societo adoptis kiam oni foriras de la scenejo de la vivo.

Ĉar mi respektas la opinion aliulan, mi ne klasigas tiujn agmanierojn kiel kritikindajn. Mi nur pensas ke por mia propra persono ili estas tute nenecesaj. Do, mi esperas ke mia tro amata familio alkonformigu sin al tiu simplanima deziro, kiu devenas el la maniero kiel mi rigardas la morton: tre natura fiziologia fenomeno, kiu nepre neniu preterlasas.

Tiel ĝenerala, tiel normala, tiel banala ĝi estas, ke mi opinias senbezone reliefigi ĝin per specialaj ceremonioj.

Tial, mi deziras ke oni eyitigu al la miaj la scenon pri vestigo de la mortinta korpo, kiu povas bone esti envolvita nur

en littuko. Oni ne faru invitojn aŭ komunikojn por la enterigo, nek sepatagan funebran meson, ankaŭ ne funebrajn vestojn. La funebro montriĝas ĉe la koro, kaj ne en la vesto.

Mi insiste petas al la miaj ke ili ne plilonigu la naturan ĉagrenon, kiun alportos mia morto. Ili distru sin, promenu, helpu al la Tempo la bonfaran laboron forgesigi. Nenia avantaĝo estas, per daŭre larmantaj okuloj, igi amaraj la tagojn de nia mallonga ekzistado.

Do, ili ne uzu nigrajn vestojn, kiuj plie ne estas higienaj ĉe nia klimato; serĉu amuzaĵojn, teatrojn, festojn, vojaĝojn, por forigi tiun nubon kiu malhelpas la normalecon de la ĉiutaga vivo. Necese ni devas konformigi nin al leĝoj de la naturo.

Al miaj filoj mi petas ke ili ne forlasu la vojon de la honoro, de la laboro kaj de la devo; kaj kunprenu kiel gvidilon, ĝin alten levante, la puran, honestan kaj senmakulan nomon kiu estis mia familia heredaĵo, kaj kiun mi postlasos al ili, kiel plej valoran riĉaĵon kiun mi posedas.

Al mia tre amata Edzino, tiel sentema, tiel impresiĝema, kiu tiel malfacile konformiĝas al la afliktoj de nia vivo, mi petas ke ŝi ne konsideru mian morton kiel neripareblan malfeliĉon; mi petas ke ŝi konsoliĝu rapide, por ke ne restu mallumigita de la doloro tiu spirito viveca, inteligenta, sprita, kiu estas la ĝojo de nia hejmo kaj la preta konsolo kontraŭ la suferoj kiuj kelkfoje sin prezentas al ni. Tie staras niaj filoj, la burĝonoj pere de kiuj ni revivos — la sekuraj garantioj de nia senmorteco; ili prenos sur sin alporti tra la spaco kaj la tempo la erojn de niaj korpoj kaj spiritoj al ili konfiditaj, kiam ili naskiĝis.

Tuŝante miajn havaĵojn, ili estu dividitaj de mia Edzino inter niaj filoj. Mi insiste petegas kaj esperas ke la monaj materiaj aferoj neniam alportos la plej malgrandan malpaciĝon inter la niaj; tio estus por mi la plej doloriga eventualaĵo.

Mi petas al miaj filoj ke ili respektu nediskuteble la dividon faritan de mia Edzino.

Borges Sitônio; 2-a sekr. Edilson Nepomuceno; bibliotekisto, Antônio Lima Santos; oratoro, Adauto Barreto; kasisto, Danilo Couto Escócia; arta kaj muzika direktorino, fraŭlino Rita Xavier.

RECENZO

José Henrique Rodó — ARIEL — El la hispana lingvo tradukis Manuel Fernández Menéndez — Antaŭparolo — Biografia noto pri la Aŭtoro — kaj aldono de la tradukinto. Eldono de Urugvaja Esperanto-Societo — okaze de la 50-jara Jubileo de «ARIEL». — Montevideo — 1950. 1 vol. 158 p. Mendu al la Libro-Servo de B. E. L.

ARIEL estas fama verko de eminenta pensulo, kiun la tuta mondo devas koni. La tradukinto meritas laŭdon pro sia laboro kaj Urugvaja Esperanto-Societo pro la bela eldono. Plia eldonejo aperis en Esperantujo pro tiu libro, kaj esperabile iam ĝi eldonos ankaŭ lernolibrojn kaj propagandilojn por plivigli nian movadon en Hispanameriko, tiu grandega mondo de la estonteco.

La sola detalo pri kiu mi povus ion diri kontraŭ la traduko de tiu bonega verko estas la severa kritiko de Rodó kontraŭ la usona materialismo de la pasinta jarcento; sed la tradukinto tre lerte nuligas mian opinion pri tiu aspekto de la afero.

La lingvo estas tre bona. La tradukon reviziis la Prezidanto de la Akademio de Esperanto, Inĝ. J. R. G. Isbrucker; tial mi, simpla homo, etburĝa esperantisto, tute ne rajtas paroli pri kelkaj, ja tre malmultaj, lingvaj eraretoj, kiujn mi vidis en la libro. Efektive, mi tion faris nur en fermita letero al la tradukinto, plej respekteme, por la dua eldono.

En niaj naciaj lingvoj ne ekzistas nomo propra por Usono. Ĉi tiu granda lando okupas unu trionon de Nordameriko; la du ceterajn trionojn okupas Meksiklando, Kanado kaj Kubo; sed nur ĝi malhavas nomon, tial oni diras en diversaj lingvoj, plej malklare: Ameriko, Nordameriko, Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, por nomi tiun solan sennomon landegon. Nur en Esperanto, laŭ mia scio, ne ekzistas tia konfuzo, ĉar en Esperanto tiu Respubliko havas sian

nomon tute klare kaj precize difinitan. Ĝi estas *Usono*, unu el la landoj de Nordameriko. Nu, pro fideleco al la originala teksto, la tradukinto nomas tiun landon Nordameriko kaj ties loĝantojn nordamerikanoj. La leganto atentu do pri tiu troa fideleco de la tradukinto.

La libro, konsiderinda pliriĉigo de nia literaturo, devas ekzisti en ĉiuj bibliotekoj de Esperantujo.

NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO, de Louis Bastien, eld. de The Esperanto Publishing Company Ltd., Anglujo, 1950, 320 p., tolbindita, prezo en la libro-servo de B.E.L. Cr\$ 50,00.

Unue frapas nian okulon la bela aspekto de la volumo de Generalo Louis Bastien: bonega papero, korekte presita, bele bindita libro tuj fierigas esperantistan koron.

La Aŭtoro prezentas al ni la Esperantan vorton en komparo kun la sama radiko en la lingvoj latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa, por reliefigi la perfektan internaciecon de Esperanto. Lian celon li brile trafas. Nenecese aldoni aliajn lingvojn, ĉar tiuj 8 reprezentas la tutan okcidentan kulturan vortaron. Se li aldonus la holandan, la svedan, la danan, li nur redirus la germanajn vortojn; se aperus la pola, la ĉeĥa, la bulgara, ili havus la samajn formojn de la rusa. Sekve, li nur evitis senutilan balaston.

La vortoj en la portugala lingvo estas en la oficiala ortografio, korekte skribitaj, t.e. ili prezentas la vivantan lingvon de nia tempo. Tiun fakton oni devas reliefigi, ĉar samtempe aperis alia leksikono en Nova Jorko, prezentanta 27.000 internaciajn vortojn, sed skribitajn en antaŭdiluva ortografio, kiu vundas nian okulon kiel fosiliaj monstroj.

Certe ĉiu lernema esperantisto dezirus havi en sia biblioteko tiun belan volumon kaj dankos al la Aŭtoro kaj al la Eldonintoj la gravan servon faritan en nia movado.

MIKSAJOJ

NEEGALECOJ

La du flankoj de la vizaĝo prezentas ĉiam neegalajn. El ĉiu kvino da personoj, du ne havas la okulojn lokitaj laŭ horizontala linio. El ĉiu deko da personoj, sep ne vidas egale per la du okuloj, la vidkapablo ĉe unu estas malpli perfekta ol ĉe la alia; kaj la dekstra orelo ĝenerale staras iomete pli alte ol la maldekstra.

— * —

EL BRASILIO MACHADO

La agado de nia laboro estas malrapida kaj silenta, kaj ĝuste pro tio ĝi estas efika kaj longedaŭra.

Malrapida kaj silenta estas la guto da akvo, kiu el la profundo de la tero traboras geologiajn tavolojn, ĝis ĝi aperas supraĵe de la grundo kaj timeme ĝi glitas, kaj timeme ŝanceliĝas...

Kaj tiel naskiĝas la riveroj.

Malrapida kaj silenta estas la kosma materio, kiu komenciĝas per neperceptebla kerno, kaj densiĝante, densiĝante, ĝi fariĝas nebulozo...

Kaj tiel naskiĝas la steloj!

— * —

LA ROLO DE LA FARMACIISTO

Monteiro Lobato

La rolo de la farmaciisto en la mondo estas tiom nobla kiom necesega. La farmaciisto reprezentas la ligilon inter la Medicino kaj la suferanta homaro. Li estas la atenta gardisto de la armilprovizejo per kiu la kuracisto batalas kontraŭ la malsanoj. Estas li kiu plenumas la rekviziciojn, je iu ajn horo, kaj en la tago kaj en la nokto. La devizo de la farmaciisto estas la sama de la soldato: servi. Unu servas al la patrujo, la alia servas al la homaro, ne rimarkante diferencon pri haŭtkoloro aŭ

raso. La farmaciisto estas vera mondĉivitano. Ĉar kiel ajn grandaj estas la vanteco kaj malhumileco de la homoj, la malsano ĉi tiujn malaltigas, kaj tiam la farmaciisto ilin vidas laŭ la reala aspekto. La homa fierego povas erarigi ĉiujn personojn, sed ĝi ne trompas la farmaciiston. La farmaciisto filozofe ridetas en la fundo de sia laborejo, preparante recepton, ĉar laŭ vidpunkto de la medikamentoj preskribitaj, nenia distingo ekzistas inter la hepato de iu Rothschild kaj tiu de la nigra kamparano, kiu eniras en la apotekon por aĉeti 50 centavojn da manao kaj kasifolio.

(Ĉi tiun verkaĵeton Monteiro Lobato dediĉis al sia amiko farmaciisto Cândido Fontoura, per la jenaj vortoj: «*Fontoura: La bonaj amikecoj estas kiel la bonaj vinoj — ili pliboniĝas kun la tempo. Monteiro Lobato*».

Trad. *Kotinju*

— * —

ANEKDOTO

Du kanguruinoj promenadis kun siaj idoj en la belaj aŭstraliaj herbejoj.

La idetoj estis kunportitaj en la natura poŝo kiun posedas la makropinoj por tie gardi kaj konduki siajn idojn. Tiu poŝo, kiel ĉiuj scias, estas lokita antaŭe de la ina ventro.

La du idetoj profitis la babiladon de siaj patrinoj por amuzi, ludante unu kun la alia, ĉiu en sia poŝo. Subite, unu el ili komencis saltadi el la poŝo sur la grundon, kaj tuj ree de la grundo en la poŝon.

Tiu rapida ekzerco ŝajnis tre perforta al ĝia kunuleto, kiu petis al ĝi ne daŭrigi ludon kiu povus kontuzi ĝin.

— Mi ne povas, respondis la makropido, panjo nun singultas!

Trad. el «*Boletim Semanal de Rotary Club do Rio de Janeiro*».

**HELPU AL LA MOVADO VARBANTE
NOVAJN MEMBROJN!**

ESPERANTO, CIEL UTILA

Nia argentina samideano Jorge P. Bondone, el Bell Ville (Pr. Cordoba) skribis al ni pri bonfaro antaŭ kelka tempo ricevita; dank'al nia lingvo.

Pro nebona funkciado de la organismo de lia frateto, iu kuracisto preskribis por la infano pilolojn de glutamaco, unu el la konataj amino-acidoj. Sed la kuracisto avertis samtempe ke ĉi tiu medikamento tute ne estis trovebla ĉe la enlandaj apotekoj. Premite de la cirkonstancoj, li ekpensis direkti sin al iu fremda samideano kiu povus helpi al li ekhavi la preskribitan kuracilon.

Li skribis tuj al sia esperanta korespondanto F. S. Almada, en Santos, kaj post nur dek tagoj li ricevis la kontentigan respondon: pakajeton kun dezirataj piloloj. Tiel danko estis S-ro Bondone al nia komplezema samlandano, ke li petis al ni konigi la fakton per nia organo.

Esperanto na Imprensa do Brasil

Inseriram artigos e informações sôbre o Esperanto, dos quais tivemos conhecimento:

Ceará — "O Campônio", de Limoeiro do Norte.

Rio Grande do Norte — "O Gráfico", órgão do Sindicato de Trabalhadores na Indústria Gráfica de Natal: A. Castor de Lima escreve sôbre a passagem do 10.^o aniversário da morte de Odilon de Araújo. "Diário de Natal"; "Tribuna do Norte"; "Jornal de Natal"; "A Ordem"; "A República": no n. de 11 — 6, 2.^o aniversário da secção "Esperanto & Esperantismo"; no n. de 9-5, Arlindo C. de Lima comenta o fato de a notícia da mudança da Rua ABC para Rua Esperanto ter sido publicada na coluna "O impossível acontece", de Patricia de Queirós, da revista "O Cruzeiro".

Pernambuco — "Jornal Pequeno", de Recife; "Jornal do Comércio" e "Diário de Pernambuco", ambos com "Novas anotações para o problema de uma língua universal", por Moacir S. Cunha.

Estado do Rio de Janeiro — "O Rebate" (11-6), de Macaé.

São Paulo — "Edipo", n. 1 — Artigo do diretor Júlio de Abreu Filho, sôbre "Esperanto", assim terminando: "O Esperanto não conseguirá superar a língua inglesa, e esta pode ser aprendida rapidamente através do *Basic English* (!)". "Jornal de São Paulo" — O suplemento domi-

nical de 25-6 insere contestação ao que afirmou no suplemento de 14-5 o Sr. F. Tenfuss, de Mirassol, presidente da *Sociedade Idista Brasileira*. Totalmente favorável ao Ido, declara arcaico o Esperanto e passa sua atenção sôbre o "Occidental", de E. de Wahl, como salientou Ismael Gomes Braga, que assim concluiu sua contestação: "Não discutiremos, porém, o Esperanto, porque é conquista posta fora de debates, pela sua ampla divulgação, pela sua rica literatura, pelo seu uso cada dia maior no rádio. Seria tão ridículo discutir e Esperanto hoje, como discutir as vantagens e desvantagens de falarmos o português e não alguma outra língua melhor e mais divulgada no mundo. O português é para nós uma fatalidade histórica, porque os colonizadores do Brasil foram lusitanos. O Esperanto é uma fatalidade pela sua divulgação em 62 anos de vida e saúde". "Folha da Manhã" — Publicou artigo de Gondim da Fonseca, sôbre o Esperanto, cuja conclusão é: "A necessidade de uma língua internacional parece-me tão evidente, que nem precisa de ser encarecida".

Rio Grande do Sul — "Idade Nova"; "A Reencarnação", Março, Abril e Maio; "Correio do Povo", de Pôrto Alegre: no n. de 28-3 conta Alberto Flores que, tendo a Sociedade Esperantista de Pôrto Alegre enviado, por ocasião do Natal, um cartão de boas festas à Liga Portuguesa de Esperanto, foi êle devolvido da lusa terra, com um carimbo, que diz: "Devolvido ao remetente. Importação interdita"!

Minas Gerais — "Estado de Minas" (2-5); "Diário de Poços de Caldas".

Mato Grosso — "O Progressista", de Campo Grande.

Rio de Janeiro — "Jornal do Brasil"; "Tribuna da Imprensa"; "Diário de Notícias"; "Jornal do Commercio".

A. C. C.

Pri la "Historieto el vermlando"

Ni ricevis la jenan leteron, kiun ni plezure publikigas:

Estimata redaktoro,

Kiel redaktoro de "Norvega Esperantisto" mi havas la ĝojon regule ricevi kaj legi multajn Esperanto-gazetojn el la tuta mondo, inter tiuj ankaŭ la "Brazilan Esperantiston". La majajunian numeron mi ricevis antaŭ du tagoj, kaj en ĝi mi trovis mian "poemon" pri la vermo, kiu svatis! Sed mi ja jam sciis, ke la versaĵo aperis tie, ĉar mia brazila amikino f-ino Astrojilda Guerrini en São Paulo (kiu eĉ kontribuis al "Norvega Esperantisto") en aerpoŝta letero

NEKROLOGO

Lastatempe nia movado perdis kelkajn el siaj bonegaj laborantoj. Hodiaŭ ni sciigas pri la forpaso de konataj esperantistoj:

PROF. PAUL CHRISTALLER

Naskita en Basel, Svisujo, en 1860, li atingis 90 jarojn, en Aŭgusto 1950. Li mortis en Stuttgart, Germanujo, kie li loĝis. Esperantisto de 1904, ĉiam aktive laboris por nia lingvo, en diversaj fakoj. Li verkis du gramatikojn kaj la grandan vortaron germanan-Esperantan.

atentigis min pri mia kontribuo al via gazeto. Mi tamen ne sciis, kiun el miaj versaĵoj vi trovis!

Sed mi volas ankaŭ rakonti al vi iom pli pri tiu poemo. Vi do ĉerpis ĝin el la "Dana Esperanto-gazeto", kiu siavice ĉerpis ĝin el "Norvega Esperantisto", kie ĝi unuafoje aperis! La titolo por skandinavoj havas duoblan senceon, ĉar Vermlando estas belega kaj tre konata distrikto en Svedujo (apud la norvega landlimo, oriente de Oslo). Kaj mi origine dediĉis tiun poemon al mia amiko s-ro C. Stop-Bowitz, prezidanto de Norvega Esperantista Ligo kaj Akademiano — ĉar li estas zoologo, kaj precipe okupas sin pri vermoj! Mi ankaŭ menciis, ke s-ro Stop-Bowitz respondis al mia versaĵo per versaĵo samritma:

Kore dankas mi pro verso de amiko J. Rosbaho. (Am-poemo ja konvenas por fianĉo: malmonaĥo!) Al mi, zoologo, kiu studas ĝuste la lumbrikon, certe interesas koni ankaŭ ties svat-taktikon. La procedo priskribita de la brava vers-farinto estas tamen eĉ pli trafa ol supozas la leginto: La svatado al la propra fino estas vere sprita, ĉar lumbriko estas vere besto ja — hermafrodita!

Kaj al ĉiuj tiuj linioj mi respondis: Tre versaĵne sciis la lumbriko, ke hermafrodita estas li, sed malpli bone fino estis instruita — eble nur la unu fino studis la zoologion, kaj nun ĝuste tiu fino havas la problemon: kion fari se erare svatis li per la malĝusta fino, ĉar en tiu kazo estas ŝi li — kaj li mem fraŭlino!

Kun koraj salutoj via

Johan Hammond Rosbach

PROF. GUSTAV J. RAMSTEDT

La plej malnova el la finnlandaj esperantistoj mortis en Novembro 1950, en Helsinki, 77-aĝa. Granda lingvosciencisto, li estis notinda sciinto pri aziaj lingvoj, kaj aŭtoro de la unua gramatiko de la korea lingvo. Kiel reprezentanto de Finnlando en Japanujo, li estis la sola diplomato kiu povis paroli en la lingvo de la lando, skribis "Heroldo de Esperanto".

M. SOLOVIEV

En nia maja-junia 1950 numero, oni trovas poemon de D-ro Mihail Soloviev, kaj kelkajn biografiajn notojn pri ĉi tiu pioniro de Esperanto.

Nun ni kun malĝojo sciigas pri lia morto en Cavtat, Jugoslavujo, kie li loĝis.

M. Soloviev naskiĝis en Oktobro 1874 en Odessa, Rusujo, kaj ankoraŭ knabo, studento, li enskribiĝis sub n-ro 1610 en unu el la "Adresaroj" de D-ro L. Zamenhof, tiam presitaj en la gazeto "La Esperantisto", ĉirkaŭ 1890-91, kiam estis publikigitaj liaj unuaj esperantaj versaĵoj. Krom esti juĝisto, li instruis jursciencon, estis talenta kantarta amato, fotografisto, ŝakisto kaj sportisto.

JAUME GRAU CASAS

Li naskiĝis en 1896, en Barcelono, kaj mortis en Valencia, Hispanujo, en Novembro 1950. Esperantisto de 1914, li multe verkis en nia lingvo: artikolojn kaj versaĵojn kaj tri poeziajn librojn. Li tradukis la belan "Barbaraj prozaĵoj" kaj estis la ĉefa kompilinto de la grava "Kataluna Antologio". En nia julia-aŭgusta 1950 n-ro ni reprenis lian tradukon de bela Gongoreca soneto de Sor Juana Inés de la Cruz.

Vizito de Alilanda Esperantisto

Santos havis ankoraŭfoje grandan ĝojon gastigi fremdan esperantiston. Temas pri s-ro Roland Dupuis, el Francujo, sed loĝanta en Svedujo kie li edziĝis al sveda korespondantino.

Estis intenco de la geedzoj transloĝiĝi kun sia kvarjara fileto Christer al Brazilo, sed neatendita okazaĵo ilin malebligis resti inter ni, kaj jam la 23-an de Novembro ili denove enŝipiĝis kaj reiris al Svedujo.

S-ro Dupuis travivis ĉirkaŭ dumonatan restadon en Santos, vizitis nian ŝtatan

ĉefurbon diversfoje, kaj tie faris kelkajn prelegojn pri lia sperto pri Esperanto.

Akompanis lin dum la unua vizito du el la direktoroj de Centro Esperantista de Santos, s-roj F. S. Almada kaj Carlos Siqueira da Cunha, kiuj lin ebligis konatiĝi kun la plej multaj samideanoj de São Paulo.

Tie li pritraktis francajn temojn uzante ĉiam Esperanton, kaj kiel entuziasma esperantisto li brile propagandis por nia movado.

En Santos li faris prelegojn, en privataj kolegioj kaj en la sidejo de Centro Esperantista de Santos, kiun li akurate vizitis kaj kie sindone oferdonis instruajn ludaĵojn por paroligi la gelernantojn de s-ro Almada. Sendube paroligi gelernantojn estas malfacila afero por la kursgvidantoj, ĉar la instruisto ne povas konversacii kun ĉiuj samtempe. Li devas sin direkti al iu, kiu tamen devas lin respondi, kaj post la respondo tiu paroligito denove mutiĝas, ĝis kiam oni lin denove vekas... Se la nombro de la gelernantoj estas granda, verŝajne ĉiu parolos unu fojon dum la konversacia kunveno.

S-ro Dupuis bonvolis alporti al ni kelkajn rimedojn per kiuj ni sukcesas paroligi pli ofte la «rondan familion», kaj tio estas por ni ĉiela donaco.

La plej grava agado de nia vizitinto tamen rilatas la alparoladon gratulan kiun li faris en la Prefektejo loka ĵus post kiam oni estis aprobinta leĝon pri enkonduko de Esperanto en komunuman lernejon.

Sciinte pri la eventuala aprobo de tiu leĝo, s-ro Almada, kiu ĝin sugestis, invitis lin fari tiun alparoladon, kaj li ĝentile konsentis pri ĝi. Je la 15-a horo de la 21-a de Novembro ili kunvenis ĉe la Prefektejo kaj prizorgis ĉion necesan. Eĉ la fotografiston oni mendis ĉe la redakcio de la gazeto «A Tribuna», konsiderata la oficiala organo de la urbo. Je la 16-a oni sciigas al ili ke la leĝo estis ĵus aprobata, kaj ke la tuta konsilantaro devas eliri el la kunsidojo por la kafo...

S-ro Almada sin direktas al la Prezidanto de la Konsilantaro kaj lin sciigas pri la

deziro kiun li havas elmontri konkrete, per Esperanta alparolado lian sinceran dankon pro tiom grava okazintaĵo, kaj tiamaniere aŭdigi la lingvon kiun ili tiel afable ebligis esti enkondukata en oficialan lernejon de ili mem kreitan. Samtempe li petis permeson por ke oni fotografu la aŭdantaron, ktp., ktp. Ĉio permesita, s-ro Dupuis elmontris per belega alparolado la gravan paŝon donitan de la klera konsilantaro, kiun li afable gratulas, promesante propagandi en Eŭropo por Brazilo kaj Santos, kie li vidis ke Esperanto progresas kontentige ĝis tiu serioza okazintaĵo!

Dume tradukis liajn vortojn s-ro Almada, kaj la fotografisto fiksas la bildon de la ĉeestantoj kiel memorigaĵon de la gravega okazinta fakto.

Ni sincere bedaŭras la foriron de nia agema kaj klera amiko s-ro Dupuis, kies kunvivon ni neniam forgesos. Ni ankaŭ memoriĝos lian kleran edzinon, kiu tiel bone parolas Esperante. Ŝi estigis sinceran amikecon al geesperantistoj kun kiuj ŝi konatiĝis en Santos kaj S. Paulo.

(Laŭ letero de S-ro Almada)

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

ALEMANHA — A policia de Hamburgo informou que dentro de poucos meses os esperantistas estrangeiros que por lá passarem poderão contar com o auxílio de 100 policiais de ambos os sexos que falarão o Esperanto.

ARGENTINA — A associação esperantista "Esencia, Cérebro, Orden (E.C.O.), de Buenos Aires, comunicou-nos a eleição de seu novo Plenum-Komitato, de que é presidente o senhor Luis Martinez Ungria, e secretário o Sr. Hector Julio Balza.

AUSTRIA — O Ministério de Instrução concedeu novamente ao Museu Internacional de Esperanto, em Viena, a subvenção de 6.000 shilling.

FINLÂNDIA — No liceu de Somero, cujo diretor é o nosso samideano Reitor Joel Vilkki, está ensinando inglês e Esperanto a esperantista francesa Marie C. Major. O ensino do Esperanto é obrigatório em certas classes do liceu.

— O Ministério do Exterior da Finlândia adquiriu algumas centenas de exemplares da obra "Norda Kanto" do acadêmico francês Georges Duhamel, na tradução em Esperanto do Sr. Roland Dupuis, samideano que há pouco tempo visitou o Brasil. A bela edição, em ótimo papel e fartamente ilustrada, foi adquirida para distribuição gratuita aos esperantistas de outros países, pelos esperantistas finlandeses, que apenas pagarão o porte do correio.

FRANÇA — A Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, que se constituiu durante o Congresso de Bournemouth, já tem membros esperantistas em 18 países. Celebrou sua primeira reunião internacional, por ocasião do Congresso de Paris, em 1950.

GRÃ-BRETANHA — Em 1950 ensinaram o Esperanto 22 estabelecimentos de educação, com a frequência de 1.542 estudantes.

HOLANDA — O Ministério de Instrução estuda a modificação da Lei de Ensino, para estabelecer, facultativamente, o ensino do Esperanto em tôdas as escolas holandesas. Em certas escolas municipais já foi introduzido este ensino.

— Estão marcados para 12 a 14 de Maio os Congressos — 10.º de Flandra Ligo Esperantista (F.L.E.), e 18.º, de "La estonto estas nia" (L E E N), a se realizarem na cidade de Hilversum.

— Na ilha de Texsel foi inaugurado há pouco o novo monumento comemorativo do Esperanto, que tinha sido destruído por ocasião da última grande guerra.

— Em Eindhoven, sede das mundialmente conhecidas fábricas Phillips, fundou-se o Clube Esperantista Phillips, para difundir o ensino do Esperanto por todo o pessoal, da sede e das sucursais de todos os países.

ITALIA — Roma — Frei M. Carolfi, o presidente da Liga Internacional de Esperantistas Católicos, é confessor jubilar na Basílica de São João de Latrão. Em seu confessionário foi colocado o dístico: "Oni konfesas en Esperanto", durante todo o Ano Santo (*La Rondo*, Sept. 50).

— Rádio Roma (Via Vittorio Veneto 56) irradia interessantes programas de Esperanto todos os domingos e sextas-feiras, de 17 a 17,20 (tempo médio europeu), em ondas curtas 19,5m e 31,1m.

— Itala Esperanto-Federacio e Itala Instituto de Esperanto continuam a fazer boa propaganda de nossa língua. Numerosos cursos de Esperanto funcionam, entre eles os de Flo-

rença, Mântua, Milão, Pisa, Ragusa, Roma, Turim e Udine.

— O prof. Lapenna realizou conferências em Roma e em Milão, e também os professores G. Canuto e C. Grazzini, em Pisa.

PORTUGAL — Finalmente reconheceram as autoridades portuguesas a injustiça do ato que proibiu a propaganda do Esperanto em Portugal. O *Diário de Lisboa*, de 6 de Abril, insere interessante trabalho — "Pequena amostra de Esperanto", de nosso eminente e valeroso samideano Saldanha Carreira. Também *A Voz do Operário*, órgão da Sociedade de Instrução e Beneficência *A Voz do Operário*, publicou, da lavra de José Antunes, excelente artigo sobre o Esperanto e seu uso nas relações comerciais, dedicado aos alunos do Curso Comercial.

SUIÇA — Nosso samideano egípcio T. Megalli passou dois meses neste país, em propaganda do Esperanto. Em suas impressões publicadas no número de Janeiro-Fevereiro de *Svisa Espero*, declarou que no decorrer de sua viagem pela Europa encontrou na família Liechti, que o hospedou em Zurich, a primeira família verdadeiramente verde (*la unua vere verda familio*). Todos falam o Esperanto; o casal Liechti e a filha Heidi, de 6 anos, com perfeição, e Editó, de 3 anos, compreende tudo e já fala bem.

LIVROS RECENTEMENTE APARECIDOS

	Cr\$
EKSPEDICIO KON-TIKI, de Thor Heyerdhal	100,00
KREDU MIN, SINJORINO, de Cezaro Rossetti	45,00
INTER SUDO KAJ NORDO, de Szilagyi	50,00
MIRU, PENSU, RIDU, de Paul Bennemann	45,00
NAULINGVA ETIMOLOGIA LEK-SIKONO, de L. Bastien (2.ª ed.)	50,00
RETORIKO, do Prof. Dr. Ivo Lapenna	40,00

FUNDAMENTA KRESTOMATIO:

Encadernada	Cr\$ 60,00
Brochada	Cr\$ 40,00